

№ 2018:2 (mar-apr)

Anoncoj

Kandidatoj por 2018; Stipends for the LK and NASK; Symposium on multilingualism; Monda Skolta Ĵamboreo; Volunteer with E-USA; Have a question? We've got answers; MeKaRo en Majo; Nova retbabilejo; Books on sale; Helpu reklami Esperanton ĉe rok-festivalo; Korespondi deziras

Media hits

Air & Space; New Yorker; Fiction Advocate

De la estraro

Raportoj de la Direktoroj kaj aliaj estraranoj.

Nikvo WOODS

laŭdoj • Charlotte BURTON

Multaj el ni volas partopreni en Esperantujo pli. Multe da lernantoj demandas, kie ili povus renkonti pli da esperantistoj, aŭ kion ili farus ĉe Esperantaj kunvenoj.

Loke

Pri TKEK-2018; kantado en Seatlo

Local Esperanto groups getting help

de la prezidanto • Filipo DORCAS

Due to the huge importance of local groups, we have set up a new position in each region, the regional coordinator.

Diverse program at the Seattle LK

anoncoj • Jordon KALILICH

Lately we've been working on the program for the *Kongreso* and can now share some more of the exciting details.

After the LK, go camping in Esperantujo

anoncoj • Nikvo WOODS, Jordon KALILICH

We're having a post-congress camping trip in the famous Mt. Rainier National Park from July 16 until July 19. This is a great opportunity to extend your time in *Esperantujo*.

Medaloj de mortinto

enigmoj • Daĉjo RUTAN

Ŝibolet ĵus salutis gardiston en la librejo, kiam iu en apuda salono krie vokis kuraciston. Li haste eniris la salonon kaj trovis grandan malpacon.

Senintencaj esperantaĵoj

Nulo; Sola



Anoncoj

Kandidatoj por 2018

La Kandidatiga Komitato nomumis unu kandidaton por Kasisto kaj kvin kandidatojn por Direktoroj de Esperanto-USA. Ili estas



Ofico	Nomo
Direktoro	Hans BECKLIN
Direktoro	Timoteo BORONCZYK
Direktoro	Jordan KALILICH
Direktoro	Timoteo RICE
Kasisto	Murray MERNER

— Fred MEYER, III, Estro de la Kandidatiga Komitato de Esperanto-USA por 2017-2018 f3meyer@texoma.net

Stipends for NASK, LK

By means of a grant from our kind friends at the Esperantic Studies Foundation, we are providing stipend support for participants of NASK and the Landa Kongreso (National Congress / Conference). Please see our webpages about these events:



- **Esperanto-USA** <<http://www.esperanto-usa.org/>>
- **Landa Kongreso** <<https://landakongreso.org/eo/hejmo/>>
- **NASK** <<http://nask.esperanto-usa.org/>>

Online you can find applications for **stipends for the Landa Kongreso** <<http://bit.ly/2psc4gh>> and **scholarships for NASK** <<http://bit.ly/2pscGCs>>.

— Filipo DORCAS, President, Esperanto-USA filipo@grupoj.org

Symposium on multilingualism

Multilingualism in International Organizations and International Co-operation will take place on Thursday and Friday, May 10 and 11, at the Church Center, 777 United Nations Plaza, New York, beginning at 9:00 a.m. on May 10th.



The annual symposium is organized by The Study Group on Language and the United Nations, founded in part on the initiative of the Universal Esperanto Association, with support from the Esperantic Studies Foundation (ESF).

Multilingualism in international co-operation entails both costs and benefits: costs because it requires mechanisms such as the selection of multilingual staff and the mediation of language professionals; benefits because, if properly managed, it includes all parties to decision-making, promotes consensus, supports program delivery, and aids dissemination of results. Thus it favors social justice and inclusion. Increasingly, multilingualism is seen as a positive force, though it is not always recognized as such by all stakeholders.

This symposium seeks to focus on, and generate interest in, these issues. Contributions will address the challenges of supporting multilingualism in organizations or in sites of international co-operation across different sectors (e.g. business, diplomacy, economics) or communities. Theoretical and methodological studies will be included, as well as those addressing specific practical challenges — especially papers that focus directly on the work of the UN system or other international bodies, or research having obvious implications for their work. Keynote speaker will be Michele Gazzola (Humboldt University, Berlin), well known as a specialist on the economics of language policies.

To find out more about the symposium, or to register, please visit the **website of Language and the UN** <<http://www.languageandtheun.org>>.

Monda Skolta Ĵamboreo

En Aŭgusto 2019 okazos en Nordameriko la Monda Skolta Ĵamboreo, organizota de Kanada Skolta Asocio, Usona Skolta Asocio (BSA) kaj Meksika Skolta Asocio.



Skolta Esperanto-Ligo (SEL) ĉiam klopodas ĉeesti tiujn aranĝojn, kaj petas vian helpon por kontakti eks-membrojn de la skolt(in)aj movadoj kanada, usona kaj meksika kiuj parolas Esperanton, aŭ geesperantistojn kiuj pretos helpi en budo dum la monda ĵamboreo.

Por pli da informo:
skolta_esperanto_ligo@yahoo.com.

Volunteer with E-USA

The Esperanto-USA National Talent Bank is a list of individuals willing to volunteer time and possibly specific skills when needed. We're currently looking to fill the following positions:

- **Graphic designer**
Design logos and other graphic elements for print and web use.
- **Ombudsman**
Investigate member concerns and facilitate communication with the Board.

Please contact info@esperanto-usa.org if you're able to help. The latest list of positions can always be found on our website.

Have a question? We've got answers. (Well, usually.)

Where does the name "Usono" come from?

What are E-USA's various funds for?

What sound do ducks make in Esperanto?

Have an Esperanto-related question you can't find an

answer for? We've got a column for that. It's called *demandu al Usona Esperantisto*, and we welcome your questions in Esperanto or English.

Contact us at bulteno@esperanto-usa.org and we may feature your question (along with a hopefully helpful answer) in an upcoming issue.



Mez-Kanada Renkontiĝo venos en Majo

Aliĝu nun por MeKaRo en Tririvero; ĝi okazos de la 19-a ĝis la 21-a de Majo 2018.

La Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto (MeKaRo) estas turisma semajnfino kiu okazas ĉiujare, alterne en Kebekio kaj en Ontario, dum la longa semajnfino en Majo, t.e., la semajnfino de la Tago Nacia de la Patriotoj en Kebekio kaj de la Viktorina Tago en Ontario. Ĝin organizas la Esperanto-Societo Kebekia kaj lokaj Esperanto-kluboj en Kebekio kaj Ontario.

Ĉiuj informoj aperas en la **retejo de MeKaRo**

<<http://mekaro.ca/>>.



Nova retbabilejo

Al la redakcio lastatempe alvenis anonco pri nova retbabilejo, laŭdire iniciato de la Moskva Esperanto-Asocio. Ĉe aranĝitaj babilhoroj, homoj kunvenos por grupe babili rete, kun sono kaj video.



En la **retpaĝo** <<https://retbabilejo.weebly.com/>> oni povas spekti pasintajn sesiojn kaj legi detalojn pri la sekvanta.

On sale in the online store

EXCESS INVENTORY SALE! Many of our books in the online store have been marked down to \$3.00

in order to sell them quickly. This offer is for a limited time only. To see all these books see our **\$3 sale at the online store** <<https://goo.gl/fhR9yW>>.

Other specials:

- ITALA ANTOLOGIO. Giordano AZZI, ed. \$25.70. Catalog#: ITA001. **Link** <<http://bit.ly/2EKoRtH>>.
- BLANKAJ NOKTOJ. Fjodor DOSTOJEVSKIJ. \$26.90. Catalog#: BLA002. **Link** <<http://bit.ly/2EJUqdm>>.
- TAROKOJ KAJ EPOKOJ. Christian DECLERCK. \$27.30. Catalog#: TAR002. **Link** <<http://bit.ly/2EJzxyzg>>.
- NEMEA/NEMESIS. Alfred NOBEL. \$27.90. Catalog#: NEM001. **Link** <<http://bit.ly/2EKWuBA>>.
- ĈERIZA ĜARDENO. Anton ĈEĤOV. \$25.60. Catalog#: CXER02. **Link** <<http://bit.ly/2EKTJAG>>.
- ABC-GRAMATIKO DE ESPERANTO Christiane DE VLEMICK & Emile VAN DAMME. \$28.30. Catalog#: ABC003. **Link** <<http://bit.ly/2EKjLEb>>.
- KOMPLEKSIA MEDICINO KAJ SAAMA AKUPUNKTURO. Puramo CHONG. \$28.40. Catalog#: KOM001. **Link** <<http://bit.ly/2EKaXxz>>.
- RUSA NOVELARO – LA 19A JARCENTO. Aleksander KORĤENKOV & Nikolai LOZGAĈEV (ed.). \$28.60. Catalog#: RUS003. **Link** <<http://bit.ly/2EHUB9e>>.
- LUZIDOJ, LA. Luís de CAMÕES. \$29.60. Catalog#: LUZ001. **Link** <<http://bit.ly/2EK4piU>>.
- KIEL ISRAELO ELPELIS LA PALESTINANOJN. Dominique VIDAL & Sébastien BOUSSOIS. \$30.00. Catalog#: KIE004. **Link** <<http://bit.ly/2EKp2LX>>.

- GEFIANĈOJ, LA. Alessandro MANZONI. \$30.50. Catalog#: GEFO01. **Link** <<http://bit.ly/2EHTCG4>>.
- ESE0J MEMORE AL IVO LAPENNA. Carlo MINNAJA (ed.). \$31.40. Catalog#: ESE002. **Link** <<http://bit.ly/2EKqfCS>>.
- RIKOLTO. Juan Régulo PÉREZ. \$32.20. Catalog#: RIK002. **Link** <<http://bit.ly/2EJ3qzH>>.
- ORDENO DE VERDA PLUMO. Josip PLEADIN. \$33.00. Catalog#: ORDO01. **Link** <<http://bit.ly/2EJ3boh>>.
- MENADE BAL PŬKI BAL (FESTLIBRO POR REINHARD HAUPENTHAL). \$40.30. Catalog#: MEN001. **Link** <<http://bit.ly/2EJpUAA>>.
- ŜVEJK. Jaroslav HAŜEK. \$40.50. Catalog#: SXVE02. **Link** <<http://bit.ly/2EHUNoY>>.
- ELEKTITAJ POEMOJ KAJ AFORISMOJ. Christian MORGENSTERN. \$19.00. Catalog#: ELE007. **Link** <<http://bit.ly/2BPgK8H>>.

Informi pri Esperanto ĉe *Pol'and'Rock*

UEA kaj la Eŭropa Komisiono de UEA petas helpon kolekti €4500 por realigi Esperantan agadon en Augusto 2018, ĉe la junulara festivalo *Pol'and'Rock* (antaŭe nomita *Woodstock*). Al ĉiuj du eŭroj donacotaj, UEA aldonos unu el propra buĝeto, tiel ke organizantoj ricevos entute la sumon de almenaŭ €4500.

Oni povas **sendi donacon** <<https://uea.org/alighoj/donacoj>> al UEA konto “Informado”, aldonante kiel celon: “por Woodstock”.

Pol'and'Rock estas mondfama kultura festivalo, kie partoprenos pli ol 600 000 junuloj inter la 2-a kaj 4-a de Augusto. Filmeto kaj pliaj informoj **troveblas rete** <<http://www.gazetaro.org/woodstock>>.



Korespondi deziras

Mi estas samideano kiu loĝas en Demokratia Respubliko Kongo, precize oriente de ĝi. Mi petas korespondadon kun iu ajn esperantisto.

Athanase Namutema Wabasobe
MANA N BRINSON B.P428

CANGUNGU – RWANDA
AFRICA



namutemaathanase@gmail.com

De la estraro

En ĉiu numero de *UE* ni petas la estraranojn iomete raporti lastatempajn farojn aŭ alimaniere komunikigi kun vi, la membraro. Ni bezonas ankaŭ vian partoprenon, karaj membroj, do bonvolu sendi al la redakcio viajn demandojn, proponojn aŭ eĉ plendojn por la estraro. Ni bonvenigas reagojn en aŭ Esperanto aŭ la angla, laŭ via prefero. La redakciaj adresoj troviĝas en la kolofono.

Charlotte BURTON, Direktoro

Feliĉan printempon! Mi multe laboris dum la pasintaj monatoj. Mi skribis tri ĉapitrojn pli de mia venonta lernolibro kaj komencis paroli kun grafika desegnisto pri la desegno de la libro. Mi esperas skribi malnetan version de la unua duono antaŭ NASK kaj LK ĉi-somere, por ke mi povu montri ĝin al kelkaj kaj aŭdi iliajn pensojn.



Plue, pro la malavareco de Esperanto-USA, ESF, kaj aliaj, mi povos ĉeesti la LK-on kaj NASK ĉi-somere. Mi ankoraŭ neniam ĉeestis NASK-on, kaj mi tre antaŭĝojas. Esperanto-USA, per subvencio de ESF, havigas stipendiojn por la LK kaj kunlaboras kun aliaj por havigi niajn proprajn stipendiojn por NASK.

Krom tiaj aferoj, mi laboras vigligi mian *YouTube*-kanalon. Mi kreas “Esperanto Explained” – serion de mallongaj videoj, kiuj eksplikas diversajn aferojn pri la gramatiko de Esperanto. Kaj mi plibonigas mian


instruadan scipovon per malavara subvencio de ESF, per kiu mi povos plibonigi kaj mian libron kaj mian instrumanieron. Mi jam komencas lerni pri la instruado de fremdaj lingvoj de la plej grava instruistaro por instruistoj de fremdaj lingvoj en la lando.

Mi estos eĉ pli okupata dum la venontaj monatoj, sed kia bona okupiĝo!

— Charlotte BURTON

Nikvo WOODS, Direktoro

Dum la pasintaj du monatoj mi multe okupiĝis pri la planado de la Landa Kongreso kaj la Postkongresa Tendumado, kaj pri kelkaj grandaj ŝanĝoj al nia loka klubo en Seatlo.



Tamen, mi povis ankaŭ ĉeesti la Tutkalifornian Esperanto-Kongreson en Sakramento en Marto kaj ege amuziĝis la tutan semajnfino. La kongreso plenplenis de amuzaĵoj, bonaj konversacioj, kaj konataj kaj nekonataj vizaĝoj. Mi volas gratuli kaj danki al Amanda HIGLEY-SCHMIDT kaj Trio (Ed WILLIGER) por la bonega organizlaboro por la kongreso, kaj Alena ADLER por la kunordigo de la koncerto (mi ne sciis ke estis tiom da talentaj esperantlingvaj muzikistoj en Kalifornio!).

— Nikvo WOODS

Media hits

Air & Space

The Smithsonian's *Air & Space* magazine published an article about

Japanese scientist Wasaburo Oishi, discoverer of the jetstream <<https://goo.gl/hxa44K>>. *Why Was the Discovery of the Jet Stream Mostly Ignored?*, the article asks. The suggested answer: *Maybe because it was published in Esperanto.*

AIR&SPACE
Smithsonian

[Had] Ooishi not been an Esperantist, U.S. scientists during World War II might have been more aware of a national vulnerability. Between 1923 and 1925, Ooishi completed almost 1,300 observations of fierce high-altitude winds, later named the jetstream. [...] Ooishi announced his discovery of the swift, high-altitude river of air in the Tateno observatory's annual reports, which he published in Esperanto. Not surprisingly, his research was ignored, and the U.S. military was caught off guard [...].

Unfortunately, the article never addresses the logical follow-up question: Is there any reason to believe American scientists would have paid attention had Oishi published in Japanese?

Maybe not. **A report published by the American Meteorological Society** <<https://goo.gl/fRGNRE>> explains that Oishi distributed his report to scientists worldwide, and his goal in using Esperanto "must have been to maximize the comprehension of the report by a world community that had little acquaintance with the Japanese language."

The New Yorker

To finish his "**Shouts & Murmurs**" humor column from Apr. 16 <<https://goo.gl/nMbf5R>>, *The New Yorker* staff writer Ian Frazier adds the following one-liner:

Take my globalist wife — please! Or, for the strict globalists who speak only Esperanto: *Prenu mian*

tutmondisman edzinon
— *bonvole!*

Fiction Advocate

In March, the magazine *Fiction Advocate* published an interview with translator **Sebastian Schulman**

<<https://goo.gl/2Zxjas>> about his translation of Spomenka Štimec's *Kroata milita noktlibro* into English.

In addition to questions about the work itself, the interviewer asks:

Interviewer: At first it seems odd: why is this book about life in Croatia during the war in 1990 written in Esperanto?

Schulman: [...] The main languages of Yugoslavia, whether we call them Croatian, Bosnian, or Serbian, or some combination thereof, are all mutually intelligible. And yet one of the principal ideas about Esperanto used to be that a common auxiliary language between disparate peoples would help bring about peace instead of conflict. The use of Esperanto to write about the ultimate failure of communication between peoples united by a common language is then a biting critique of the false promises that both "Yugoslavia" and "Esperanto" seemed to offer [...]

Yet, the choice of Esperanto isn't just an instrument of critique. Štimec also uses Esperanto to embed a profound sense of optimism in the work. Although the world of the novel is in absolute disarray, the belief the people are still good and that hard, difficult work can bring us to a better place is at the core. What better language to keep the embers of hope alive than Esperanto — the word itself means "one who hopes."



Spomenka Štimec

CROATIAN WAR NOCTURNAL

Translated from the Esperanto
by Sebastian Schulman

Nikvo Woods

laŭdoj • Charlotte BURTON



Multaj el ni volas partopreni en Esperantujo pli. Multe da lernantoj demandas, kie ili povus renkonti pli da esperantistoj, aŭ kion ili farus ĉe Esperantaj kunvenoj. Pri tiaj demandoj pensis Nikvo WOODS, kaj li laboras respondi.

Kune kun Ben SPEAKMON kaj Jordon KALILICH, Nikvo pretigas la Landan Kongreson en Seatlo. Li diras, ke

la tri vere laboras teame pri la kongreso. “Preskaŭ ĉion pri la kongreso decidis almenaŭ du, se ne ĉiuj tri de ni.” Plue, “Janjo faras multe, precipe pri la grafika desegno, kaj Chuck [MAYS] kaj Filipino [DORCAS] donas tian institucian scion, kian ni bezonas por krei bonegan okazaĵon.” Nikvo mem laboras pri la muziko, la notoj pri la LKK-kunvenoj, kaj multaj aliaj aferoj.

Krom tiu teama laboro, Nikvo ankaŭ starigas la unuan postkongresan tendumadon kaj laboras revigligi USEJ-on. La postkongresa tendumado okazos tuj post la Landa Kongreso ĉi-jare. La ideo starigi tendumadon komenciĝis pro la mirinda natura beleco de nordokcidenta Usono. Nikvo diras, ke jam estas sufiĉe da partoprenontoj por havi tre bonan okazaĵon, inkluzive de kelkaj el aliaj landoj. Oni povas ekscii pli pri la tendumado en **la LK-paĝaro**

<https://landakongreso.org/en/post-congress-camping-trip/>.

Ni dankas al Nikvo pro lia laborado por starigi bonajn okazaĵojn por esperantistoj en Usono, kaj por revigligi USEJ-on, aldone al lia laborado kiel estrarano de E-USA.

Loke

Pri TKEK-2018

en kapo mia

ludante bilardon kun dek-jaraĝa Danjela,

brakumante fratinton ŝian, Aŭtunon,

revidinte, post dek jaroj, samklasanon mian,
Simonon,

parolante kun nova amiko Elinjo,

aŭskultante la voĉon de Alena, kantanta.

Larmojn sur ambaŭ vangoj, permesis mi resti.

— Keneĉjo GOLDBERGO, *Sakramento, Kalifornio, Marto 2018*

Tiel la mondo iras en Seatlo

Nathan MCCARTNEY estas muzikisto de Anacortes,
Vaŝingtonio kiu lernas Esperanton. Dimanĉon, la
8-an de Aprilo, li koncertis ĉe la trinkejo *Tim's
Tavern* en norda Seatlo kaj ludis kanton en
Esperanto: ***Tiel la mondo iras*** <<https://youtu.be/4dNRtJ9ZEGY>> de kuba esperantisto Juliano

Hernández ANGULO.

— *Nikvo Woods*



Local Esperanto groups getting help

de la prezidanto • Filipino DORCAS

Due to the huge importance of local groups, we have set up a new position in each region, the regional coordinator. This is a new asset, a new initiative. It's not really a campaign, since campaigns often have a beginning and an end. Our new position in each region will be a continuous help for now and also into the future.

Many local groups face challenges, and we cannot "reinvent the wheel" in each local group. We are strengthening our communication infrastructure to enable communication between local groups, between the groups and their coordinator, and between each group and Esperanto-USA.

Go to our website and click on groups to see the list of regions. Click again on the appropriate link to view the page for your region. At the top of each region page you'll find a link to contact information for its regional coordinator.

What kind of help?

How can the regional coordinator help you? What help do you need? What are the main challenges of your local group? The leaders of Esperanto-USA cannot decide this for you, because each group is unique. Moreover, each group has its own purpose and vision. You with other members of your group decide what your challenges, needs, goals, and activities are.

Your main questions and challenges

Most often, the most important task of improving a local group is to discover your main goal, your reason for being, your core values. Discovering these goals can be more important than getting your answer. But what do you do now? Choose your questions from our list or write your own.

1. In your local Esperanto group what are your common goals, visions, and projects?
2. Is your contact information correct in our groups database?
3. Do you have contacts from Esperanto students in Duolingo, Lernu!, or other courses?
4. Is someone in your group a host for your local Duolingo events? **The Duolingo events site** [<https://events.duolingo.com/>](https://events.duolingo.com/) can put you in contact with hundreds of Esperanto students in your area.
5. Is your local group active in social media? Discuss what works with your regional coordinator.
6. Have you considered using **Meetup** [<https://meetup.com/>](https://meetup.com/)?
7. Are you publicly announcing local meetings? (online, printed or broadcast news media)
8. Which reporters of your local newspaper or television stations report on issues related to languages or human rights?
9. Are you sending announcements or articles to them? Do you already have contact with a local journalist?
10. Does your library or community center provide a meeting room for groups that serve the public?
11. Do members of your local group have family members in the public schools or colleges? If so, is it possible to start an Esperanto club at school?
12. Have you contacted language teachers in your local schools or colleges? Why? Why not?
13. Are there some members of your local group who are also members of non-Esperanto organizations? (Kiwanis, Lions Club, Masons, scouts, religious organizations, Mensa, chess clubs, amateur radio, etc.) If yes, do they look for program topics? And do their newsletters accept articles or ads on diversity or intercultural programs?
14. Are there international fairs, exhibitions or intercultural days in the community, schools or colleges?
15. Does your club have any promotional material? Brochures? Post cards? Business cards?
16. Is there any possibility to present Esperanto to

the public to your library or community center?

17. Does your club have regular programs?
18. What does your club do for the beginners, the new members?
19. How did your local group members become interested in Esperanto? Note that **personal stories** are often the most effective persuasion tools.
20. Do members of your group want regular classes? How can the club help the members progress in their language skills?
21. Have you requested Esperanto materials in your local bookstores and libraries? It helps to ask personally even if there is an online catalog.
22. What are your ideas for how to help other local groups? What has worked for your group that you wish to share with others?
23. Do you use the **Amikumu** app or other tools to find local students who do not know your


club?

24. Which online tools do the members of your local group use to interact with one another?

Your local group might want to discuss these issues, discover your goals, and create plans. Of course, communicate with your regional coordinator! They want to help you. We have your coordinators for all ten regions. Please keep your regional coordinator updated with your progress.

Help for local groups including the availability of regional coordinators is a service of Esperanto-USA.

Onward and upward!



Filipo DORCAS

Filipo estas prezidanto de Esperanto-USA. Li kaj lia edzino Elizabeto loĝas en Fort Worth, Teksaso.

filipo@grupoj.org

Nulo

senintenca *esperantaĵo* • Jorge Rafael NOGUERAS



Rafa atentigis nin pri la jena reklamo, kiun li trovis en gazeto: temas pri marko de manĝaĵo por “nulo-hundoj” – bestoj, kiujn oni evidente taksas tute senvaloraj! Nutru vian hundon per *nulo*, kaj ĝia sano pliboniĝos je ... nulo?

Diverse program at the Seattle LK

“We want to put on a congress like none other in the US.”

anoncoj • Jordon KALILICH



The Congress will be held at Seattle Pacific University.
(Photo © **Westlake78, CC-BY-SA 4.0** <<https://goo.gl/REBHbN>>.)

In recent issues we've given you the basic information about this year's *Landa Kongreso*: the dates (July 13-16), the location (Seattle, Washington — which has beautiful weather in July!) and a few details about the program. Lately we've been working more on the program and can now share some more of the exciting details.

We're very happy to have Chuck Smith, who will give a keynote speech on the congress theme, *Building and Enjoying an Esperanto Community*. He'll also teach participants how to talk to others about Esperanto, and will present Esperanto culture himself in an English-language lecture open to the public.

Dr. Federico Gobbo, professor of Interlinguistics and Esperanto at the University of Amsterdam, will give a lecture titled *Interlingvistiko en la 21-a jarcento: novaj ŝancoj, novaj defioj* (“Interlinguistics in the 21st Century: New Opportunities, New Challenges”). At the banquet, he'll also address the congress theme with the speech *Kiel transformiĝas la Esperanta komunumo: nuntempaj tendencoj* (“How the Esperanto Community Is Transforming: Current Trends”). Dr. Gobbo has sent us summaries of his lectures, which you can read below.

Besides talks, we plan to include interactive sessions: locals Leland “Haruo” Ross and Arlyn Kerr will invite participants to sing, and board member Charlotte Burton will lead a beginners' conversation circle. There will also be a game room where you can play board games and other games in Esperanto.

Once again, the National Congress is actually for two countries, and our Canadian friends will also lead sessions:

Paul Hopkins, President of the Canadian Esperanto Association, will introduce us to Chinook Wawa, which once served as an intercultural language in this part of North America. He'll also give a mini-course in Lushootseed, a language of some of the region's indigenous peoples.

Wally du Temple will discuss the history of the Northwest Regional Esperanto Conference (NOREK), which US or Canadian Esperantists have organized every year since 1981. (This year, since it's the Americans' turn to organize it, the LK will serve as NOREK.)

Another Canadian, Yevgeniya Amis, will tell us about Gregorian chanting and the “other” international language: music! She'll also talk about the 2020 *Universala Kongreso* in Montreal, the first UK in either of our countries since 1984.

No LK is complete without excursions, and we can now announce several: Haruo Ross will show visitors some local ZEOs (Zamenhof/Esperanto objects), while Arlyn and Les Kerr will lead a tour of the famous Pike Place Market downtown.

We want to put on a congress like none other in the US, which is why we're most excited about its culmination: the concert! It'll be held near the Space Needle in a real concert venue with professional staff. Between the venue and the participants (who are, shall we say, especially talented ...), we're sure the night will be an unforgettable one.



Chuck Smith

That's just some of the program we're planning. And we're not done yet: we need your help. Do you want to lead an activity, talk about your favorite subject, or perform at the concert? We want to hear from you! Contact us at seatlo2018@esperanto-usa.org.

To find out all about the event, including the rest of the program and the ever-growing list of participants, visit the **congress website**

<<https://landakongreso.org>>. To sign up, go to E-USA's online store. Thanks to a generous grant from the Esperantic Studies Foundation, those who can't afford the registration fee can **request a stipend from E-USA** <<https://goo.gl/QWDoiu>>.

See you in Seattle!



Diversa programo ĉe la seatla LK

“Ni celas okazigi kongreson, kian oni neniam spertis en Usono.”

En la lastaj numeroj ni donis al vi la bazajn informojn pri la ĉi-jara Landa Kongreso: la datojn (13-16 Julio), la lokon (Seatlon, Vaŝingtonio – kies julia vetero estas belega!) kaj kelkajn detalojn pri la programo.

Lastatempe ni pli prilaboris la programon, kaj nun ni povas dividi kun vi pli da ekscitaj detaloj.

Ni ĝojas gastigi s-ron Chuck SMITH, kiu faros

ĉefprelegon pri la kongresa temo, *Konstruado kaj ĝuado de Esperanta komunumo*. Plue, li konsilos al kongresanoj, kiel paroli kun aliuloj pri Esperanto, kaj mem prezentos la Esperantan kulturon en anglalingva prelego alirebla de la publiko.

D-ro Federico GOBBO, profesoro de la katedro Interlingvistiko kaj Esperanto ĉe la Universitato de Amsterdamo, prelegos pri la temo *Interlingvistiko en la 21-a jarcento: novaj ŝancoj, novaj defioj*. Ĉe la bankedo, li traktos ankaŭ la kongresan temon per la parolado *Kiel transformiĝas la Esperanta komunumo: nuntempaj tendencoj*. D-ro Gobbo sendis al ni resumojn de siaj prelegoj, kiujn vi povas legi fine de tiu ĉi anonco.

Krom prelegoj, ni celas inkluzivi interagajn programerojn: lokanoj ROS' Haruo kaj Arlyn KERR invitos partoprenantojn kanti, kaj estrarano Charlotte BURTON gvidos konversacian rondon por komencantoj. Estos ankaŭ ludejo, kie oni povos ĝui tabuloludojn kaj aliajn ludojn Esperante.

Refoje la Landa Kongreso estos efektive dulanda, kaj ankaŭ niaj kanadaj amikoj prezentos programerojn:

Paul HOPKINS, Prezidanto de Kanada Esperanto-Asocio, prezentos al ni la ĉinukan piĝinon, kiu iam rolis kiel interkultura lingvo en ĉi tiu parto de Nordameriko. Li ankaŭ gvidos kurseton de la laŝucida, indiĝena lingvo de la regiono.



Federico Gobbo

Wally DU TEMPLE traktos la historion de la Nordokcidenta Regiona Esperanto-Konferenco (NOREK), kiun organizas usonaj aŭ kanadaj

esperantistoj ĉiun jaron jam de 1981. (Ĉi-jare, ĉar estas la vico de la usonanoj organizi NOREK-on, la LK rolos kiel ĝi.)

Alia kanadano, Ĵenja AMIS, informos pri gregoria ĉantado kaj la “alia” internacia lingvo: muziko! Ŝi parolos ankaŭ pri la Universala Kongreso de 2020 en Montrealo, la unua UK en iu el niaj du landoj de post 1984.

Neniu LK estas kompleta sen ekskursoj, kaj ni jam povas kelkajn anonci: Ros’ Haruo montras lokajn ZEO-jn (Zamenhof-Esperanto-objektojn) al vizitantoj, dum Arlyn kaj Les KERR ĉiĉeronos ĉe la fama bazono *Pike Place* en la urbocentro.

Ni celas okazigi kongreson, kian oni neniam spertis en Usono, kaj pro tio ni plej ekscitiĝas pri ĝia pinto: la koncerto! Ĝi okazos proksime de la turo *Space Needle* en vera koncertejo kun profesiaj teĥnikistoj. Pro la ejo kaj la partoprenontoj (kiuj estas, ni diru, aparte talentaj ...), ni certas, ke la nokto estos neforgesebla.

Tiuj estas nur kelkaj el la programeroj, kiujn ni planas. Kaj ni ankoraŭ ne finis: ni bezonas vian helpon. Ĉu vi volas gvidi agadon, preparoli vian plej ŝatatan temon aŭ muzikumi ĉe la koncerto? Ni volas, ke vi kontaktu nin! Sendu mesaĝon al seatlo2018@esperanto-usa.org.

Por vidi ĉion pri la evento, ekzemple la ceteran programon kaj la daŭre kreskantan liston de aliĝintoj, vizitu **la kongresan retpaĝaron**

<<https://landakongreso.org/>>. Por aliĝi, iru al la retbutiko de E-USA. Danke al malavara subvencio de Esperantic Studies Foundation, tiuj, kiuj ne kapablas pagi la kotizon, povas **peti stipendion de E-USA** <<https://goo.gl/QWDoiu>>.

Ĝis revido en Seatlo!



Prelegoj de Federico GOBBO

Interlingvistiko en la 21-a jarcento: novaj ŝancoj, novaj defioj

La vorton “interlingvistiko” inventis la belga esperantisto kaj stenografisto Jules MEYSMANS en 1911, sed nur en 1931 ĝi populariĝis inter lingvistoj,

post prelego de Otto JESPERSEN, la fama dana lingvisto. Kio okazis al la fako ekde tiam? Ĉu la origina difino de Jespersen ankoraŭ aktualas? Se ne, kial? La prelego ofertas unue superrigardon pri la temo. La ĉefaj historiaj periodoj de interlingvistiko estas: unue, la pionira epoko (1879-1911), kiam oni ĵetis ties bazojn; due, la fonda epoko (1911-1951), kiam okazis la interlingvistikaj militoj por decidi la plej “taŭgan” formon de helplingvo; trie, la skola epoko (1951-1990), kiam sendependaj interlingvistikaj skoloj formiĝis en diversaj landoj, ĉefe Germanujo, Hungarujo, Italujo, Nederlando, Polujo, ĉiuj kun aparta atento al Esperanto; fine, la nuntempa lingvopolitika epoko (1990-nun), ekde kiam interlingvistiko pli firme dialogas kun aliaj fakoj, ĉefe lingvistiko kaj diversspecaj sociaj kaj politikaj sciencoj, aparte per la temoj tutmondiĝo, lingva justeco, mastrumado de multlingvismo, novaj formoj de movebleco. Multon oni esploris en la pasinta jarcento, sed ankoraŭ pli da laboro atendas la esploriston en la 21-a jarcento. La prelego prezentos esplor-programon kiu indas plenumi por montri kiel interlingvistiko kapablas kontribui, al la fakuloj kaj al la ĝenerala socio samtempe.

Kiel transformiĝas la Esperanta komunumo: nuntempaj tendencoj

Laŭ la oksforda filozofo Luciano FLORIDI, ni travivas nur la kvaran revolucion de la homaro, kiu estas ankaŭ alivorte nomata bitrevolucio. Post la perdo de la centro de la universo (unua revolucio, per Koperniko), la perdo de la centro de la naturo (dua revolucio, per Darwin) kaj la perdo de la centro de la homa racio (tria revolucio, per Freud), en la pasinta jarcento la homaro perdis la centron de la agenteco (kvara revolucio, per Turing). Alivorte, nuntempaj homoj ne plu konsidereblas nekonektitaj agentoj kiuj agas en la medio kaj modifas ĝin individue, sed kompleksaj inform(ig)aj agentoj, kiuj konstante rilatas ne nur al naturaj agentoj (animaloj kaj plantoj) sed ankaŭ – kaj ĉefe – al la artefaritaj, kiuj estas faritaj el bitoj. Tiuj inform(ig)aj agentoj finfine ŝanĝas en la profundo kaj la naturon kaj la vivmedion. Malgraŭ ke Esperanto estas tipa produkto de la dua revolucio – kiam la homaro ankoraŭ fidis je la saviga povo de la racio – ĝia pluekzisto pruvas, ke la Esperanta komunumo sukcese adaptiĝis al la ŝanĝoj de la tempoj, kaj aparte al la ekesto de la aliaj du

revolucioj. La prelego intencas oferti analizon pri la nuntempa situacio de la Esperanta komunumo kaj la neceso kaj oportuno adaptiĝi al la nuntempa realo, kiu estas farata de tiuj kompleksaj agentoj vivantaj en informmedio, kaj instigi al pripensado de la rolo de Esperanto kaj aparte de ĝia komunumo en la nuntempo.



Jordon KALILICH

Jordan is a programmer in Seattle, Washington.

jordon@kalilich.com

Medaloj de mortinto

enigmoj • Daĉjo RUTAN



La forpaso de Jakobo IDZORGANT forprenis de la mondo grandan bonfaranton.

S-ro Idzorgant, tutviva fraŭlo kaj la sola ido de antaŭa ŝtatestro, dediĉis sian vivon al la bonstato de malriĉaj infanoj tra la mondo.

Profesoro Elija ŜIBOLET estis unu el la multaj funebrantoj kiuj vizitis la hejmon de Idzorgant je la plej varma tago de la jaro. Post esprimo de respekto

al la mortinto en la dormoĉambro, la fama krimsolvisto trapasis varmegan, homoplenan salonon kaj eniris librejon. Tie estis montrita kolekto de medaloj kaj aliaj honoraĵoj. Diversaj organizoj kaj ŝtatestroj donis ilin al la mortinto pro lia laboro por infanoj. Kelkaj el la medaloj kun inkrustitaj juveloj estis grandvaloraj.

Tuj post kiam Ŝibolet salutis la gardiston en la librejo, iu en la apuda salono krie vokis kuraciston. La profesoro kaj la gardisto haste eniris la salonon, kie ili trovis grandan malpacon.

En siaj brakoj juna viro portis svenintan junulinon al la ĉefpordo de la domo. Fotografisto de loka ĵurnalo rapide sekvis ilin. La viro momente aspektis konfuzite, sed poste li akre riproĉis: “Bonvolu ne foti. Ŝi estas Karen SENVER, nevino de la mortinto. Respekte lasu min porti ŝin eksteren.”

Ŝibolet ordonis al la gardisto deteni la paron. Sekve li hastis al la librejo ĝustatempe por kapti viron, kiu provis forŝteli la kolekton de valoraj medaloj.

Kio suspektigis Profesoron Ŝibolet?

Bonvolu sendi **nur unu** solvon al redakcio (adresojn trovi en la kolofono) **antaŭ la 15-a de Junio**. Inter la solvintoj ni lotumos du premiojn.

After the LK, go camping in *Esperantujo*

anoncoj • Nikvo WOODS, Jordon KALILICH



Mt. Rainier. (Photo © **lawdawg1**, CC-BY 2.0

<https://goo.gl/jbKNsU>.)

We're having a post-congress camping trip in the famous Mt. Rainier National Park from July 16 until July 19. This is a great opportunity to extend your time in *Esperantujo* and see not only the city but also the beautiful natural environment in this part of the world.

We'll be camping at the Cougar Rock campground, about two hours from the congress by car (100 mi.). The campground is at 3,180 ft. above sea level. Summers in the park are dry and cool, with temperatures generally between 60-80°F. The weather in the park can vary, so visitors should come prepared.

We'll have a group campsite with drinkable water, flush toilets, and picnic tables. In the summer the park offers lots of opportunities for hiking, rock climbing, and viewing natural wonders, including forests, waterfalls, and wildflowers. The campground also has an amphitheater where educational programs are offered.

If you're coming by plane (or if you just don't go camping that often), we can help you borrow, rent, or acquire the equipment needed for the experience. We'll also organize transportation to and from the campground and appreciate any help you can

provide.

This event is separate from the congress and has its own registration. Anyone who is interested should fill out the **registration form** <https://goo.gl/jRYDXw> and come camping with us!



Post la LK, tendumu en *Esperantujo*

Ni okazigos postkongresan tendumadon en fama *Mount Rainier National Park* (Nacia Parko Monto Rajnero) de la 16-a ĝis la 19-a de Julio. Tio ĉi estas bonega oportuno plilongigi vian tempon en *Esperantujo* kaj vidi ne nur la urbon sed ankaŭ la belegan naturon de ĉi tiu parto de la mondo.

Ni tendumos ĉe la tendumejo *Cougar Rock*, proks. du horojn for de la kongresejo aŭte (100 mejloj). La tendumejo situas 3180 futojn super la marnivelo. Someroj en la parko estas sekaj kaj malvarmetaj, kun temperaturoj ĝenerale inter 60-80°F. La vetero en la parko tamen povas varii, do vizitantoj venu pretaj.

Ni havos grupan tendumejon kun trinkebla akvo, akvopelaj necesejoj kaj pikniktabloj. Somere la parko prezentas multajn oportunojn marŝi, rokogrampi kaj vidi naturajn vidindaĵojn kiel arbarojn, akvofalojn kaj florojn. La tendumejo havas ankaŭ amfiteatron, kie oni prezentas informajn programojn.

Se vi alvenos aviadile (aŭ se vi simple malofte tendumas), ni povos helpi vin pruntepreni, lui aŭ alimaniere akiri la bezonatajn ekipaĵojn por la sperto. Ni ankaŭ organizos kunveturadon al kaj de la tendumejo kaj bonvenigas vian helpon pri tio.

Tiu ĉi evento estas aparta de la kongreso kaj havas propran aliĝprocedon. Interesatoj **plenigu la aliĝilon** <https://goo.gl/jRYDXw> kaj tendumu kun ni!

Sola

senintenca esperantaĵo • David C. HALLEY



Davo afable atentigis nin pri tiu ĉi marko de vino, *Sola*. Ĝi levas por li multajn demandojn, interalie:

- Ĉu oni ne trinku aliajn vinojn?
- Ĉu oni ne dividu ĝin kun aliuloj?
- Ĉu oni ne rajtas trinki pli ol unu botelo?
- Ĉu necesas trinki ĝin izolite?
- Ĉu oni kantu nur la propran kanzonon dum trinkado?
- Ĉu oni ne kantu ĥore dum trinkado ... ?

Kolofono

Redaktoro / Editor: Hoss FIROOZANIA

Kontaktu nin: <bulteno@esperanto-usa.org>, aŭ:

Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia
CPU 271205, U. of Rochester
Rochester NY 14627-1205
United States of America

Usona Esperantisto estas la dumonata bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Prefere sendu materialojn retpoŝte, kaj aldonu viajn nomon, adreson kaj foton de via vizaĝo. Kun ĉiuj aliaj fotoj bonvolu aldoni notojn pri datoj, lokoj, kaj nomoj de la foti(n)toj. Se vi sendas materialojn poŝte, ni resendos ilin al vi se vi aldonas mem-adresitan, afrankitan koverton.

Usona Esperantisto estas uzebla laŭ la permesilo de Krea Komunumo BY-SA <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/2.0/deed.eo>>. Cetere ni petas, ke oni atendu du monatojn antaŭ ol represi la plej freŝajn artikolojn.

Opinioj esprimitaj en *Usona Esperantisto* apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas vidpunktojn de la redaktoro aŭ de Esperanto-USA.

Kontribuontoj eble volus legi la kalendaron de limdatoj kaj redakciajn konvenciojn en nia retpaĝaro.



Usona Esperantisto ("American Esperantist") is the bi-monthly magazine of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English. Please send materials by email if possible and include your name, your address, and a head shot. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. If you send materials by mail, we will return them to you if you include a self-addressed, stamped envelope.

Usona Esperantisto is made available under the Creative Commons Attribution-Share Alike license BY-SA <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/3.0/>>. As a courtesy, we additionally ask that you also wait two months before reprinting the latest content.

Opinions expressed in *Usona Esperantisto* are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of the editor or of Esperanto-USA.

Contributors may want to consult the submission calendar and style guide on our website.